

**NENIU DONIS GLORON AL DIO, KROM ĈI TIU FREMDULO – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

**El la evangelio laŭ Luko 17, 11-19**

**En tiu tempo, dum Jesuo vojiris al Jerusalemo, Li pasis tra Samario kaj Galileo. Kaj kiam Li eniris en vilaĝon, iris renkonte al Li dek lepruloj, kiuj haltis malproksime kaj levis sian voĉon, dirante: „Jesuo, Sinjoro, kompatu nin!“. Tiam Jesuo diris al ili: „Iru al la pastroj kaj montru vin al ili“.**

**Ili iris, kaj dum la irado iumomente ĉiuj resaniĝis. Unu el ili, ekvidante sin resanigita, revenis, glorante Dion per laŭta voĉo. Poste li sin ĵetis antaŭ la piedojn de Jesuo, por danki Lin. Li estis loĝanto de Samario.**

**Tiam Jesuo rimarkigis: „Ĉiuj dek estis purigitaj. Kie estas la aliaj naŭ? Kial ili ne revenis por doni gloron al Dio? Neniu faris tion, krom ĉi tiu fremdulo.“ Poste Jesuo diris al li: „Leviĝu kaj iru: via fido savis vin“.**

La evangelio de tiu ĉi dimanĉo, la evangelio de Luko, ĉapitro 17, versikloj 11-19, ŝajnas simpla, tre facila legaĵo. Reale ĝi estas eble unu el la pecoj de la evangelio de Luko inter la plej kompleksaj kaj komplikaj.

Ni klopodu kompreni iome la kontraŭdirojn kaj la signifojn kiujn la evangeliisto volas doni al ni per tiu ĉi peco. Skribas Luko: *Dum Jesuo vojiris al Jerusalemo*. La evangeliisto utiligas la grekan vorton Ierusalem kiu indikas la sanktan urbon. Jesuo iras por la fina kolizio kun tiu kiu estis la tiuepoka Sankta Sidejo, la plej sankta institucio ekzistanta en la mondo, kie estis la templo de la Sinjoro.

Kaj Jesuo iras por kolizii kun tiu institucio. La itinero kiun la evangeliisto prezentas estas tamen iom stranga. Luko skribas ke *Li pasis tra Samario kaj Galileo*. Li estus devinta skribi ke li trairis Galileon kaj poste Samarion. Fakte se ni havas ioman ideon pri kiel estis Palestino je la tempoj de Jesuo, norde estas Galileo, centre estas Samario, regiono loĝata de herezuloj, de personoj konsiderataj la plej naŭzaj kaj malproksimaj de Dio, kaj fine sude estas Judujo kun Jerusalemo.

La evangeliisto do estus devinta skribi ke Jesuo pasis tra Galileo kaj Samario. Kial, male, la evangeliisto diras ke li pasis tra Samario kaj Galileo? Ĉar li volas fokusigi la atenton de la leganto pri tio kio okazas sur la tero de Israelo, en Galileo.

*Kaj kiam Li eniris en vilaĝon...* Jen la evangeliisto donas al ni altvalorajn indikojn kiuj helpas la interpretiston, la komentiston. Kiam en la evangelioj aperas la vorto "vilaĝo", oni celas ĉiam malamikecon, nekomprenemon aŭ malakcepton de la mesaĝo de Jesuo. Kial tio? Ĉar la vilaĝo estas loko ankrita al tradicio, loko subigita al urbo.

Sed dum en urbo la manieroj aperas, malaperas, ŝanĝiĝas, en vilaĝo enradikiĝas la tradicio. Vilaĝo do estas tie kie regas la ordono "kial ŝanĝi se oni ĉiam faris tiele". Do ĉiun fojon kiam en la evangelio ni trovas la indikon "vilaĝo", tio indikas lokon de tradicio ĝisekstreme kaj de nekompreneo aŭ malakcepto de la mesaĝo de Jesuo.

Kaj ĉi tie estas surprizo. *Iris renkonte al Li dek lepruloj*. Ne eblas. Lepruloj ne povas resti en vilaĝo. Lepruloj, ĉar infektitaj, devis resti ekstervilaĝe. Kial ĉi tie la evangeliisto diras ke tiuj lepruloj estas en la vilaĝo? La evangeliisto, preter la historia rakonto, volas doni al ni altvalorajn indikojn: tiuj kiuj vivas ene de la tradicio, tiuj kiuj vivas subigitaj al la tradicia religio, estas kiel lepruloj, nome malpuraj.

Ili havas neniun eblecon je kontakto kun Dio. Tiuj estas lepruloj ĝuste ĉar ili estas ene de vilaĝo. Kaj en tiu kunteksto la sinteno de tiuj lepruloj estas sufiĉe stranga. *Ili haltis malproksime*. Unuflanke la evangeliisto diris ke *ili iris renkonte al Li*, kaj aliflanke *ili haltis malproksime*.

Unuflanke ili malrespektas la leĝon kiu malpermesas al leprulo alproksimiĝi al personoj, sed aliflanke ili ĝin observas. Per la bildo de tiuj lepruloj la evangeliisto volas montri al ni la malfacilan iradon de la disĉiploj, kiuj estas fascinitaj per la vorto de Jesuo, per la libero kiun lia mesaĝo

enhavas, sed ili estas ankoraŭ sklavoj de la religia tradicio kiun ili havas en si mem.

*Kaj levis sian voĉon, dirante: „Jesuo”, ... kaj la traduko diras “majstro”, sed reale estas “ĉefo”, nu tiel en tiu ĉi evangelio alparolis Jesuon nur la disĉiploj kaj aparte Petro. Temas pri literatura artifiko, per kiu la evangeliisto volas indiki ke per la bildo de tiuj lepruloj li volas prezenti la disĉiplojn. Kaj ili pludiras: *Sinjoro, kompatu nin!*” Do unuflanke ili estas subigitaj al religio kiu malpermesas al ili la kompletan komunecon kun Dio, kaj aliflanke ili volus esti je ĝi liberigitaj, sed ne havas la forton, kaj petas helpon al Jesuo.*

*Tiam Jesuo diris al ili... Jesuo ne sanigas ilin, Jesuo ne kuracas ilin, sed donas al ili ordonon: „Iru al la pastroj kaj montru vin al ili.” Jesuo invitas ilin eliri de la vilaĝo, la sacerdotoj estis en Jerusalemo, Jesuo do invitas ilin forlasi la lokon de la tradicio, de la religia tradicio, kie regas la imperativon, tio jes estas la vera lepro, kiu malpermesas al la homoj la rilaton kun Dio. Oni ĉiam faris tiele, kial ŝanĝi?*

*Fakte, dum la irado iumomente ĉiuj resaniĝis. Jesuo plenumas neniun agon super la lepruloj, Jesuo invitas ilin eliri de la vilaĝo. Kiam ili eliras de la vilaĝo, antaŭ ol alveni ĉe la pastroj por konstati la okazintan resaniĝon, jen ili jam estas purigitaj. Sed estas surprizo. Unu el ili, ekvidante sin resanigita, Jesuo do sanigas, purigas ĉiujn dek, revenis, glorante Dion per laŭta voĉo. Poste li sin ĵetis antaŭ la piedojn de Jesuo, - sin ĵeti antaŭ ies piedoj estis signo de disĉipliĝo - por danki Lin. Li estis loĝanto de Samario.*

Jen la surprizo de la evangeliisto. Resaniĝis ĉiuj dek, ili estas purigitaj, sed nur unu revenas por danki. Kaj kiu tion faras? La persono plej malproksima de Dio, la persono forigita de Dio, la persono por kiu ne estis savo. La persono kies nura nomo, Samariano, estis io naŭza. Diri Samarianon al iu persono estis la plej fia el la eblaj insultoj, kiam oni volas ofendi Jesuon oni diras al li Samariano.

La persono plej malproksima de Dio, do, la persono kiu opinias sin ekskludita de Dio, estas tiu kiu male perceptas la agadon de Dio en sia vivo. Kaj fakte *Jesuo rimarkigis: „Ĉiuj dek estis purigitaj. Kie estas la aliaj naŭ? Kial ili ne revenis por doni gloron al Dio?.. Doni gloron al Dio estis privilegio nur de la popolo de Izraelo, el kiu la Samarianoj estis ekskluditaj... ”, krom ĉi tiu fremdulo.*”, nome la persono plej malproksima de Dio.

*Poste Jesuo diris al li: „Leviĝu kaj iru: via fido savis vin.”* La evangeliisto per tiu ĉi peco indikas al ni kaj instruas al ni kio estas la fido. Kio estas la fido? Multaj opinias la fidon donaco de Dio. Ne estas tiel. Se la

fido estus donaco de Dio pravus la pluraj kiuj opinias sin sendevigitaj ĝin havi, dirante "Al mi Dio ne ĝin donis. Bonŝanca vi kiu havas tiom da fido!"

Aŭ aliaj fidas, sed kiam okazas sortobato en la vivo, kio ĉiam povas okazi, ili diras "Mi havis tiom da fido, sed nun mi ĝin perdis". Ne! La fido ne venas de Dio, kaj la fido aŭ estas aŭ ne estas. Ne eblas ke oni ĝin havu portempe kaj poste oni ĝin perdu. La fido ne estas donaco de Dio al la homoj, sed ĝi estas la respondo de la homoj al la amdonaco kiun Dio donis al la tuta homaro.

Sed, strange, en tiu ĉi evangelio, tiuj kiuj estas laŭdataj pro sia fido estas la personoj taksataj la plej malproksimaj de Dio. Ŝajnas kvazaŭ la personoj kiuj vivas ene de iu religia sistemo havas ian filtrilon kiu malpermesas al ili vidi la agadon de Dio kaj havi fidon. Fakte Jesuo en tiu ĉi evangelio laŭdas la fidon de iu pagana centestro, laŭdas la fidon de iu ĉiesulino, la kolektujo de ĉiuj malpuraĵoj, la persono plej malproksima de Dio.

Jesuo mem laŭdas la fidon de iu virino kiu havas sangofluon, de iu persono kiu estis taksata malpura kiel leprulo; Jesuo laŭdas la fidon de la blindulo, kiu estis konsiderata malbenita de Dio. Dume, male, Jesuo riproĉas siajn disĉiplojn, malmultfidantaj homoj. La religio, ĉiu tiu tuto de ritoj, de kredoj kiuj estis instruataj al la homoj, estas la filtrilo kiu malpermesas al la homaro ekvidi la amon kiun Dio deziras komuniki al ĉiu persono, neniu ekskludita.

Estas neniu en la mondo kiu povas opinii sin ekskludita de la agado de Dio. Estas la religio – jen la vera lepro – kiu dividas inter puraj kaj malpuraj, inter dignaj kaj maldignaj, inter indaj kaj malindaj, sed ne Dio. La amo de Dio adresiĝas al ĉiu kreitaĵo. Ĝin akcepti kaj respondi, tion oni nomas fido.